

Recenzo de *L'Espéranto* de Pierre Janton  
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 587, 1975.01.08 & 11

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Sinjoro Pierre Dorthe el Lausanne, Svislando, sendis al ni ekzempleron de la libro de Pierre Janton : *L'Espéranto*. Tiu franclingva prezento de nia lingvo estas tutcerte la ĝis nun plej kompleta kaj objektiva eseo pri Esperanto aperinta en la franca lingvo. Ĝi aperis en la enciklopedia kolekto *Que sais-je ?* Traduko : *Kion mi scias ?* de la eldonejo : Presse universitaire de France, Parizo, 1973.

A.- Pierre Janton komencas sian prezenton dirante, ke Esperanto, malgraŭ sia ŝajna simpleco, estas fenomeno kompleksa. Kelkaj vidas en Esperanto la fenomenon de lingvo konstruita ekde individua intuicio kaj fariĝinta vivanta esprimilo de internacia homgrupo. Se en la komenco la lingvo dependis de la volo de kelkaj individuoj, ĝi nun evoluas laŭ specifa determinismo.

Cl.- Aliaj rimarkas en Esperanto ideologian fenomenon, kiu komencis esprimiĝi en la 17-a jarcento. Temas pri lingvoteorio kaj lingvotelado, pri humanismo en reago kontraŭ la klasika humanismo.

A.- Psikosociologoj ekzamenas, kiel, dank'al la disvolviĝo de esperanto, kreiĝis movado, kies graveco estas pli psikologia, ol materia.

Cl.- Esperanto aspiras al la plenumo de la rolo de tutmonda helplingvo. Tiun rolon nun oficiale ludas kelkaj naciaj hegemoniaj lingvoj. Kontraŭ tiu hegemonio luktas esperanto.

A.- Pierre Janton poste prave demonstros, ke esperanto ne estas izolita lingva fenomeno, kiel kredas la neinformitoj. Sed kiam oni provas kompari la zamenhofan lingvon al la aliaj planlingvaj projektoj, oni tuj rimarkas ĝian originalecon. Esperanto reprezentas mezvojon inter la skematismo kaj la naturalismo.

Cl.- La ĉapitroj pri la origino de esperanto, pri la personeco de Zamenhof kaj pri la esperantismo estas tre belaj paĝoj. Pierre Janton memorigas, ke Esperanto estas junula verko. Lazaro-Ludoviko Zamenhof estis deknaŭjara, kiam li ellaboris sian unuan projekton de lingvo universala, kaj nur dudekjara, kiam li fine publikigis sian unuan broŝuron sub la pseŭdonimo Doktoro Esperanto. Ekde la infaneco li familiariĝis kun pluraj lingvoj, sed en cirkonstancoj tiaj, ke li travivis la plurlingvecon kiel traŭman eksperimenton. Pierre Janton reliefigas la rolon de la sufero en la kreado de esperanto.

A.- Ni kuraĝigas la franclingvajn esperantistojn tre atente legi la ĉapitrojn dediĉitajn al la idealo de Zamenhof kaj al la **interna ideo**. Okaze de gravaj kunvenoj kaj zamenhofaj festoj, anstataŭ prononci banalaĵojn, kial ne laŭtlege erojn el tiu interesa eseo ? La esperantistoj neniam sufiĉe repensas la idealismon, kiu estas unu el la kaŭzoj de la dinamismo de nia komuna lingvo. Kiam ni posedos bonan tradukon de tiuj valoraj paĝoj, ni citos erojn al vi. Vi tiam rimarkos, kiel digne kaj respekteme Pierre Janton priskribas la personecon de Zamenhof kaj la kulturen streĉadon de liaj disĉiploj. Pro la ĝis nun ankoraŭ sentebla influo de Couturat, Leau kaj de Beaufront, en la franclingva literaturo pri Esperanto oni ĝenerale silentadis pri tiuj ideologiaj aspektoj, el kiuj ŝprucis nia movado.

Cl.- Granda parto de la verko de Pierre Janton estas dediĉita al scienca priskribo de Esperanto. Ankaŭ tie ĉi Pierre Janton prave forlasas iujn tradiciojn ĉefe terminologiajn, por reveni al analizo pli komforma al la diroj de Zamenhof. Li eĉ citas parton de la antaŭparolo al la *Unua Libro* kaj montras, ke en Esperanto estas malfacile fari hierarkion inter la kunmeteblaj vortunuoj, kiujn li nomas **monemoj**. Li distingas inter leksikaj monemoj, kiujn li nomas **leksemoj**, kaj neleksikaj monemoj, kiujn li nomas **morfemoj**. Tiu analizo estas taŭga kaj konforma al la moderna lingvistiko. Sed ni ne sekvas Pierre Janton, kiam li neas la distigon de leksemoj laŭ gramatikaj kategorioj. Li asertas, ke estas neeble difini verbojn aŭ substantivojn ekstere de iliaj flekcioj. Lia demonstro bedaŭrinde estas tro rapida por esti konvinkiga. Ni atendas pli detalan verkon koncerne tiun ĉi demandon, kiu jam fluigis multe da inko en la gramatika literaturo de Esperanto.

A.- Almenaŭ ni opinias, ke la franclinvaj esperantistoj ne plu rajtas ignori la novan nomenklaturon proponitan de Pierre Janton, kiel ĝis nun ili ignoris la malkovrojn de la moderna lingvistiko. La verko de Pierre Janton povas esti konsiderata, kiel bazo por diskutado inter la fakuloj, kiuj okuiĝas pri la reverko de la lernolibroj kaj de la informmaterialo pri Esperanto.

Cl.- Tiu ĉi provo pli science priskribi Esperanton, ol faris ĝis nun la tradiciemaj aŭtoroj, bedaŭrinde malkuraĝigas multajn legantojn. Se ili ne kapablas kompreni la argumentadon de Pierre Janton, ili ne tuj fermu la libron. Ili saltu la ĉapitrojn dediĉitajn al la lingvopriskribo, por astente legi la konkludajn ĉapitrojn, kiuj parolas pri la riĉeco de la esprimovo de Esperanto. La plimulto de la ekzemploj tie ĉi prezentataj estas memorindaj. Kelkaj ŝajnas imagitaj por nur demonstraĵoj kialoj. La resumo pri la esperanto-literaturo kaj ties originaleco faciligos al la studentoj la malkovron de niaj ĉefverkoj. En tiu parto de sia studo Pierre Janton bedaŭrinde kelkfoje iom troigas la valoron de nia literaturo, sed li pravas, kiam li asertas, ke ĝi ludis decidigan rolon por la estonteco de la lingvo.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!